Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 9an de februaro 2012, per Skype.

(Aprobita la 8an de marto 2012.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Eli Eriksen Fitjar en Bergen
Asbjørn Lindh en Oslo
Ulf Lunde en Os
Mario Machlik en Tromsø
Ingebjørg Rambjør en Bergen

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 8an de decembro 2011

La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio

Mankis aliron al la Skagen-kontoj, kaj pro tio la kasisto ne povis raporti pri la situacio.

3. Proceduro je membriĝo

La sekretario havu la taskon kontakti homojn kiuj petas membrecon. Dokumentojn por novaj membroj oni povas sendi per Interreto al membroj kiuj aliĝas rete.

4. Landa Kunveno 2013: datoj kaj ejo

La klubo de Oslo jam laboris pri la ejo, ricevis oferton de Haraldsheim, kaj sendis la informojn al NEL por komentoj. La estraro de NEL samopiniis ke estus bone trovi lokon ne tro for de Oslo, facile atingeblan kaj kun kunvenĉambroj praktikaj kaj dormĉambroj komfortaj. Surbaze de tio la NEL-estraro opinias ke Haraldsheim estas bona ejo, kondiĉe ke oni rezervas ankaŭ dulitajn ĉambrojn (kun banejo), kaj ke eblas tranokti ankaŭ unuope. La ejon por la festeno decidu la Oslo-klubo, sed estus praktike havi ĝin samloke kun la Kongreso, kie ajn ĝi estos.
Ni proponas la datojn 7.–9. aŭ 14.–16. junio 2013.

5. Jarraporto kaj jarkalkulo 2011

Diskuto pri la laboro pri jarraporto kaj jarkalkulo. La kasisto jam komencis la laboron pri la kalkulo. La membronombrado verŝajne montros novan grandan membroperdon. La estraro ankaŭ diskutis la ekonomian situacion koncerne nian ejon Esperantonia, kie la elspezoj estas altaj kaj kie nun ne ekzistas luantoj. La kasisto kontaktos la Domkomisionon por organizi anoncon kaj havigi novajn luantojn.

6. Oferto de Kosmo

Kosmo Strategio Ltd. (kosmo.eu.com) estas firmao kiu ofertas helpon havigi subvencion por internaciaj projektoj. Ili demandis, ĉu ni volas esti «partnero» pri seminario pri ajna temo, kiu daŭru inter 5 kaj 10 tagoj en la periodo inter oktobro 2012 kaj aŭgusto 2013, kaj kie partoprenu inter 10 kaj 20 eksterlandanoj el minimume 3 landoj.

La Ligo ne havas fortojn aranĝi tiom grandan aranĝon, sed se klubo havas fortojn, estas en ordo por ni. Tamen ni volas demandi, ĉu ni rajtas al tia EU-mono, Norvegio ja ne estas membro de EU.

7. Movada foiro

UEA demandas siajn membroorganizojn ĉu ili volas partopreni en la Movada Foiro en Hanojo la 28an de julio. Se ni volas partopreni, la limdato por respondo estos fine de majo. La estraro diskutis la aferon: Por la UK en Hanojo ĝis nun aliĝis nur unu norvego, kaj estas longa distanco por porti materialon. Tial ni ne prioritatos la ĉi-jaran Movada Foiron.

8. Komitatano

Nia komitatano A ne havos la eblecon vojaĝi al la UK en Hanojo. Ni demandos al la sola norvega aliĝinto, ĉu li ŝatus labori.

9. Eventualaĵoj

Jardar Eggesbø Abrahamsen raportis pri la progreso de la laboro pri la novaj retpaĝoj.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30–21:50.
La venonta interkonsiliĝo okazos la 8an de marto 2012.
Raportis Ingebjørg Rambjør.